Ludwig Lazarus Zamenhof,

# La vojo

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l'sorto, nek mokoj de l'homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' difinita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco -
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni, paŝo posto paŝo, post longa laboro
Atingon la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l'tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas -
Ni semas kaj semas konstante.
"Ho, ĉesu!" mokante la homoj admonas -
"Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas -
"Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
Se vi pacience eltenos!"

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantaj foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton kaj, repurigitaj
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam via bravega anaro,
Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel' unu fojon signita!

. . .

Ludwig Lazarus Zamenhof,

# Дорога

*tradukita de Владимир Иванович Карзин*

Сквозь темень кромешную к цели желанной
Идём мы с мечтой благородной .
Мерцает во тьме эта цель неустанно ,
Подобно звезде путеводной .
И нас не страшат больше бесы ночные ,
Удары судьбы и насмешки сплошные .
Кратчайший маршрут мы наметить сумели ,
И он доведёт нас до цели.

Маршрут не меняя , всё прямо и прямо
Нас сердце идти призывает .
Ведь даже вода в постоянстве упрямом
Гранитную твердь размывает .
Надежда , упорство и долготерпенье -
Вот принципы наши , и мы в упоенье
Идём шаг за шагом , сквозь жизни заботы
К плодам многолетней работы .

Мы сеем и сеем , забыв про невзгоды ,
О счастье потомков мечтая .
Пусть часть семян сгинет , но долгие годы
Мы трудимся не отдыхая .
Не нужен ваш труд , все смеясь утверждают .
Нет нужен , нет нужен , сердца повторяют .
Смелее вперёд ! Будут славить нас внуки ,
Коль выдержим мы эти муки !

Когда в злую засуху ветер суровый
Увядший листок обрывает ,
Мы ветер лишь хвалим , ведь дерево новый
Прилив свежих сил обретает .
Наш орден отважный уже не погибнет
И цель долгожданную всё же достигнет ,
Шагает он смело , в боях закалённый ,
Святою мечтой окрылённый !

. . .

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco -
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni, paŝo posto paŝo, post longa laboro
Atingon la celon en gloro.

Маршрут не меняя , всё прямо и прямо
Нас сердце идти призывает .
Ведь даже вода в постоянстве упрямом
Гранитную твердь размывает .
Надежда , упорство и долготерпенье -
Вот принципы наши , и мы в упоенье
Идём шаг за шагом , сквозь жизни заботы
К плодам многолетней работы .

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Ludwig Lazarus Zamenhof *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-969-1950 (2014-03-01 10:57:16)*

*Traduko de la Esperanta poemo "La vojo" de* Ludwig Lazarus Zamenhof *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14) en la Rusan de Владимир Иванович Карзин.*

*Arg-969-1955 (2014-03-01 14:08:47)*

*Pri la tradukinto vidu la retejon . Aliaj rus-linvaj poemoj de la sama aŭtoro troviĝas sub* http://profilib.com/chtenie/130043/ladimir-karzin-pervye-shagi-v-esperanto-30-urokov-php. *Vidu ankaŭ:* http://profilib.com/kniga/130043/vldimir-karzin-pervye-shagi-v-esperanto-30-urokov-v-stikh php